



BULTENO
DE

Malaga
Esperanto
Grupo

La Ĝenaĉero

n-ro 10

novembro-decembro


19E

UNUIGI KAJ UNUIGI

Ni ĉiuj aŭdis diri, ke por sukcesi necesas unuigi la fortojn. Plie, ni mem pruvis, ke tio certas. Tamen, bedaŭrinde, niaj travivaĵoj kaj scioj apenaŭ postlasis daŭran spuron en nia konscienco kaj, konsekvence, denove ni stumblas pro la sama ŝtono, t.e. ni malsukcesas pro samaj kialoj.

Varaj esperantistoj suferas pro la konstatebla malrapida disvastigo de nia lingvo. Ni ĉiuj strebas al la antaŭeniro de la Movado en niaj respektivaj etosoj. Mi fieras pro tio, ke, bonŝance, ekzistas tiaj personoj inter ni. Sed necesas agadi tiel, ke oni ne malŝparu ian eblon plenumi niajn celojn, ĉar, alie, la malsukceso certas.

La Movado, konkrete nia Esperanto-grupo de Malago, bezonas unuigi siajn fortojn por atingi niajn antaŭviditajn celojn kaj por prezenti nin firmaj antaŭ la ceteruloj. Ni bezonas, kaj devas, kunigi nin spirite kiel eble plej forte. La aktivuloj, kaj aliaj samaj funkciantoj



Milafojan saluton al ĉiuj! En ĉi du pasintaj monatoj ne okazis en nia grupo ia grava kunveno, sed oni daŭrigis (kaj -as, kaj -os) ĉiujn agadojn, krom ricevi plurajn vizitojn.

La okan de novembro, vendredon, akceptiĝis ĉe ni kelkaj samideanoj el la grupo de Torrox, kiun kiuj okazis konversa rondo. Komprenoble, pluraj membroj de nia grupo ne povis ne reciproki la viziton la 22an de decembro, por partopreni en la "paŝera festo" en Torrox. Bele evoluas la tiea grupo.

Nuntempe vizitas Malagon la esperantista geparo Henriko kaj Kornelja el Svedio. Ili restados ses semajnojn en Benalmádena kaj foje en tiu tempo revenos al nia sidejo, kiel ili faris unuafoje la 10an de januaro.

Vere aktivaj estas la membroj de nia grupo! Nur tion oni povas konkludi vidinte la plurajn diversajn agadojn. Nia amiko Andrés Martín aperigis poezion dulingvan, en la hispana kaj en Esperanto, en la revuo "Tientos", de la Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj. La Esperanta versio bonvenas por ĉi revuo! Fernando Prieto pretas krei novan biciklistan Esperanto-teamon (tuj apude vi havas artikolon pri tio), kaj Francisco Javier Romero ekgvidos la 20an de januaro kurson pri Esperanto en la gastejo "La Hispanidad". Ĝi okazos lunde kaj ĵaŭde, de la sepa kaj duona ĝis la oka kaj duono. Sukceson al ĉiuj!

Niaj membroj ne ĉesas, felice, aperi en la klubojn, kaj oni pensas fari parolkunvenojn (aŭ konversaj rondojn, aŭ preleghorojn), ekzemple vendrede, por ke ĉiuj praktiku la lingvon. Unu sola neprega regulo: **ESPERANTO PARLATA!**

Feliĉan vintron kaj feliĉan novjaron!

Pri la enhavo de la artikoloj responsas la aŭtoroj mem

ESPERANTA BICIKLISMA-TEAMO

En la jaro 1976 oni kreis la teamon de biciklismo nomatan "ESPERANTO-LA IDIOMO INTERNACIA-UEA" por fari disvastigon de la Internacia Lingvo kaj de la Universala Esperanto-Asocio.

La grupo havis dek membrojn. El ili nur unu esperantisto kaj la ceteraj simpatiantoj pri Esperanto.

Dum kelkaj jaroj la grupo partoprenis en multaj oficialaj kaj neoficialaj konkuradoj de biciklismo en granda parto de la suda hispana autonoma komunumo Andaluzio, en la provincoj Málaga, Granada, Córdoba kaj Cádiz. Unu kuradisto estis eĉ en la Kanaria Insularo kaj en Italio.

En tiu tempo ĉiuj membroj ricevis iajn premiojn kiel medaloj, pokaloj, mono, sportaj komercaĵoj, k.t.p. En ĵurnaloj de diversaj provincoj kaj en la esperanta revuo Horizonte aperis sciigoj pri la membroj kaj la Esperanto-teamo. Ĉi tiu sporta grupo estas konata de la delegito por sporto de UEA d-ro Gianfranco Polerani, de Milano (Italio).

La teamo malaperis pro manko de ekonomia apogo, ĉar la membroj mem pagis ĉiajn elspezojn: biciklojn, vestaĵojn havantajn la nomon de la teamo skribita sur ili, vojaĝojn, manĝojn, gastejojn, k.t.p.

Nuntempe nur unu el la kuradistoj plu praktikas biciklismon kaj faras propagandon favore al la Internacia Lingvo. Sed li trovas necesa eniri en la profesionan kampon, ĉar ĝi donas multe da famo al Esperanto kun granda puŝo al ties movado. Pro tio li estas aganta oficiale por krei novan E-teamon, ĉi-foje en la kategorio "profesia" kaj tiel povi partopreni en la plej gravaj konkuradoj de Hispanio (Vuelta a España, Ruta del Sol, Semana Catalana, Vuelta Ciclista al País Vasco) kaj de la eksterlando (Giro d' Italia, Tour de France, Milano-Sanremo, Paris-Nice, Liège-Bastogne-Liège, Tirreno-Adriatico, Midi Libre, Dauphine Liberè, k.t.p.).

Tio estos tre bona, ĉar tiuj konkuradoj estas anonca-
taj kaj komentataj en la ĉefaj ĵurnaloj de Eŭropo (El País,
Le Monde, Il Messaggero, La Libre Belgique, ABC, France
soir, Il Popolo, Diario 16, Le Matin) kaj pluraj de aliaj
kontinentoj.

Krome, kiel estas logike, la sportak okazaĵoj estas pli
larĝe komentataj kune kun fotografaĵoj en la sportaj
ĵurnaloj kaj en la fakaj revuoj pri sporto, kiuj aperas
en ĉiu semajno aŭ monato (L' Equipe, La Gazzetta dello Sport,
As, Marca, Miroir du Cyclisme, La Bici, Tutto ciclismo,
Miroir Sprint, El Ciclista, k.t.p.).

Ankaŭ la radioj kaj televido de multaj eŭropaj lan-
doj okupas sin pri informado. Aparte efikas, kiam la tele-
vido dissendas la konkuradojn tute aŭ parte dum horoj ĉiu-
tage ekde unu tago ĝis kelkaj semajnoj.

La vojo por fari realaĵo la novan Esperanto-teamon estas
certe longa kaj malfacila, estas multaj baroj por superadi.
La ĉefa problemo, kiel ĝenerale, estas la manko de mono.
Sed mi esperas atingi krei la novan sportan grupon post du
aŭ tri jaroj. Oni esperas ricevi kunlaboron de la espe-
rantista mondo.

La malnovaj vortoj de nia majstro Ludoviko Lazaro Zamen-
hof sonas freŝaj, ĉiufoje ni diras: Fine venkos Espe-
ranto, se fidelaj restos ni! Antaŭen! Dio benu la Interna-
cian Lingvon!

Salutojn kaj bondezirojn al vi, gefratoj ĉiuj, de via
vegetara samideano fondinto de la antikva E-teamo, kaj an-
kaŭ de la moderna, mi esperas...

Fernando Prieto León

(El la 9a paĝo)

strangan korpon, sed li perdis la imunan kaj malsaniĝos de
malsanoj, el kiuj antaŭe li estis resanigita. Eĉ pli, la
globulino produktita en la korpo post la transdono konside-
ros ankoraŭ la transdonitan organon kiel strangan materia-
lon kaj, fine, ĝi estos rifuzata per reakcio antiĝi-anti-
korpo.

Rafael López Castilla

INSTRUADA

PAGO

TRE SKIZA TRARIGARDO

Evidentas, ke ni malmulte diros pri Esperanto, se ni ne konas ĝian beletron. Tial, mi kuraĝis paroli ion pri la temo skizante, kiel eble plej, la evoluon de la Esperanta literaturo por, poste, laŭokaze, pligrandigi kaj klarigi la koncernajn erojn.

De 1887 ĝis 1918 aktivis en Esperantujo tri skoloj: la slava, la norda kaj la franca. La unua karakterizigis pro sia stila kaj lingva sendependeco de la francaj lingvo-kliŝoj. La dua brilis pro sia modesteco. La tria montris sin ema al eseoj kaj artikoloj. Elstaraj verkistoj de la slava skolo estis, inter aliaj, Grabowski, Devjatnin, Belmont kaj Kofman. Al la norda apartenis Langlet, Nordensvan, Nylén kaj Ahlberg, inter aliaj. Al la franca, fine, Privat, Lantier, De Beaufront, Boirac, Artignes, Beck, ktp. Rimarkindas, ke la slava skolo ampleksas du generacioj: la unuan kaj la duan.

De 1919 ĝis 1945 viglis la Budapeŝta Skolo, la Soveta kaj Proleta Skolo, la Japana Skolo kaj la Germana (proza) Skolo. Konvenas ne forgesi, ke al la budapeŝta apartenis Kalocsay, Baghy, Tárkony, Szilágyi, Baranyi kaj Svarc; al la soveta kaj proleta, Miĥalski, Nekrasov, Eroŝenko, Varankin kaj Grigorov; al la japana, Ossaka Kenĵi, Ito Saburo, Nisimura Masao, Tabata Kisaku kaj Nakagaki Kōjirō, kaj al la germana, Bulthuis kaj Luyken, inter aliaj.

De 1945 aperas pluraj skoloj. Poeziaj estas: la Budapeŝta, la skota, la proleta, la itala, la japana kaj la jugoslavia. Prozas: la angla, la itala, la japana kaj la jugoslavia. Kalocsay, Baghy kaj Hilda Dresen apartenis al la budapeŝta; al la skota, William Auld,

Dinwoodie, A. Rossetti; al la proleta Gusev kaj Armand Su; al la itala (poezia) Nicolino Rossi, Tadolini, Silber kaj Pisoni; al la itala (proza), Gabrieli kaj Conterno Guglielminetti, ankaŭ poetino; al la japana, krom la menciitaj Masao, Kenji kaj Saburo, rimarkindas Nakamura Tazuo, Kruoda Masayuki, Ueyama Masao kaj Konisi Gaku (prozisto); al la jugoslavio, Tibor Sekelj, Marinko Gjiwoje, Antonija Albert (ĉiuj poetoj) kaj la sama Sekelj, Zora Heide kaj Ante Grgurina (prozistoj), kaj al la angla Marjorie Boulton. Pri la revuoj, en kiuj aperis pluraj el la respondaj verkoj, taŭgas enlistigi la jenajn:

La Esperantisto, La Esperantiste, La Revuo, Ondo de Esperante, Literatura Mondo, Heroldo de Esperanto, la Suda Stelo, Lingvo Internacia, la Nica Literatura Revuo, Hungara Vivo, Monda Kulturo, Norda Prismo, Norda Literaturo, Ondo de Daŭgava, Malgranda Revuo, Pola Esperantisto, EK1, OOmoto, Franca Esperantisto, Sennacieca Revuo, La Pirato kaj Literatura Foiro.

Kompreneble, la temo ne alderpiĝas per ĉi tiu artikolo. Neniam mi celis tion fari. Mia intenco estis havigi al niaj legantoj mallongan skizon—pligrandigendan kaj klarigendan—pri la esperanta literaturo. Pri tio mi jam avertis pli supre.

Ĝi utilu al ĉiuj!

Andrés

(El la 1-a paĝo)

nian revuon, kaj ankaŭ aliaj personoj simpatiantaj al Esperanto, bezonas, por plifortigi sian emon al la akcepto kaj disvastigo de nia lingvo, koni la vidpunktojn ideologiajn de la kunuloj, diskuti ilin kaj, ĉiam respektante ĉies opiniojn, unue estigi esperigajn agadplanojn por, tuj poste, ekigi ties realigon. Kaj ĝuste pro tio, ke la kunlaboro valoregas, se ĝi sinceras, mi proponas al vi la estigon de esperanta societo konsistanta el personoj simpatiantaj al Esperanto, eĉ se ne apartenantaj al E-grupoj. Ni bezonas ilin por efektiviĝi niajn celojn kaj ili bezonas nin por maturigi sian esperantistecon.

Cu vi konsentas?

Andrés

LA IZOLITA ESPERANTISTO

Ofte ŝajnas, kvazaŭ la Esperanta familio konsistus el membroj kun samaj ŝancoj por praktikado de la lingvo, kaj tio ne estas vera. Ankaŭ la sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj de ĉiu lernanto de la lingvo favore aŭ malfavore influas sur tiun homon, kiu deziras lerni Esperanton. Evidente, por tiu, kiu loĝas en urbo, kie ekzistas Esperanto-Grupo, la afero prezentigaĵas multe pli facila. Se la estonta lernanto vere deziras studi kaj ellerni la lingvon internacian, kaj, kiel dirite, en lia loĝloko ekzistas esperantista societo, li devas nur aliĝi, pagi la postulatan kotizon kaj ĉeesti la lernejaĵajn klasojn. Sed ĉi tio, kio ŝajnas tiom facila, ofte ne estas realigebla, ĉar ne estas ebla la kombinado de laboro, horaro de la lernado kaj eĉ en multaj okazoj prezentigaĵas la financa problemo, kiu lasta estas grava, precipe kiam la supozebla estonta esperantisto ne estas tre konvinkita pri sia decido lerni Esperanton. Poste, kaj jam en la lernejo, la restado de la komencanto multe dependas de la kapableco de la instruisto, de la etoso reganta en la societo kaj de la entuziasmo de la lernanto. Poste, la nova esperantisto jam estas envicigita en la vivo kaj en la Esperanta mondo. Ĉu li voluos al plej altaj rangoj de kapableco kaj scio praktika de la lingvo? Tio jam estas la defic de la movado esperantista.

Aparte de tiuj problemoj supre menciitaj, por la lernanto izolita prezentigaĵas multaj aliaj. Ĉiu lernanto izolita nepre devas havi grandegan entuziasmon, ĉar sen fervoro por lerni la lingvon neniu sukcesas. Ĉirkaŭ li ne ekzistas la varmo de la grupo, la babilado kun la ceteraj lernantoj, la parolaj klarigoj de la instruisto. Li ja devas koncentriĝi en si mem kaj revii pri estontaj kontaktoj personaj, ĉiam sub la timo, ĉu lia lernado kaj fonetiko estos taŭgaj por interkompreno kun aliaj. Oni povas diri, ke izolita esperantisto estas kiel floro, kiu naskiĝas en dezerto. La leteroj estas

la sola ilo, per kiu li kontaktas aliajn esperantistojn. Ni devas pensi, ke estas esperantistoj, kiuj ĉiam vivis aŭ vivas en tiuj sociaj kondiĉoj. Ili lernis Esperanton izolitaj kaj tiumaniere ili daŭrigas sian esperantistan vivon. Sendube ilia fervoro estas admirinda. Poste, kaj kiam ĉiu lernanto sin konsideras membro de la granda familio, estas iuj, kiuj multe pli aktivas, kaj aliaj, kiuj restas kvazaŭ pasivaj. En ĉi tiu stadio de partopreno, praktika en la movado, denove aperas la izolitaj esperantistoj. Estas multaj, kiuj pro siaj ekonomiaj kondiĉoj ĉiam estas pretaj ĉeesti ĉiujn Esperantajn aranĝojn. Estas aliaj, kiuj pro manko de financaj rimedoj devas resti hejme, atendante informojn de la ĉeestintoj aŭ raportojn pri la evento en gazetoj.

Mi multa miras, kiam por reliefigi la fervoron de iu esperantisto oni mencias en la Esperantaj organoj lian ĉeeston al diversaj kongresoj aŭ esperantaj aranĝoj, kvazaŭ la posedo de mono por ĉeesti iujn Esperantajn manifestadojn donus al li pli altan kategorion, kiel esperantisto. Jes, oni povas diri, ke, ankaŭ, li estus povinta, per sia mono, iri al aliaj lokoj kaj preni parton en aliaj aranĝoj, ĉu kulturaj, ĉu sportaj, aŭ pri aliaj diversaj celoj. Tio jam estas vero. Laŭ mia opinio, oni ne povas preni kiel esperantistecon kaj kromajn meritojn la solan fakton, ĉeesti multajn kaj diversajn Internaciajn Esperantajn aranĝojn. Tio jam estas senvalorigi la fervoron de esperantistoj, kiuj, pro sia ekonomia kondiĉo, vole aŭ nevole devas ĉiam resti hejme. Se oni taksas la fervoron esperantistan laŭ la ĉeesto al diversaj manifestadoj de Esperanto, estas evidente, ke la gloron de Esperanto-laboro ĉiam oni aljuĝos al tavolo de la socio, kiu ĝuas plej favorajn ekonomiajn kondiĉojn. Sub tiu vidpunkto, ni devas alte taksi la fervoron de esperantisto, kiu ĉiam restis izolita, esperantisto, kiu maksimume ĉeestis unu aŭ du naciajn kongresojn. Ĉu ne estas mirinda la teniĝo de tiu esperantisto, kiu tie, en sia vilaĝo, jaron post jaro restas fidela al la movado? Eble lia merito estas pli granda ol tiu de esperantisto,

kiu trankvile kaj ofte, turismo-cele vizitas la kongresojn. Eble la Esperanto-movado bezonas ian specon novan de organizado, por ke en la kongresoj estu fakte reprezentataj ĉiuj tavoloj sociaj. Evidente la solvo de la problemo ne estas facila, sed almenaŭ ĉiu esperantisto devas konscii, en kia situacio disvolviĝas la nuna reprezentanteco en niaj manifestadoj je alta organiza nivelo.

Sendube unu el la plej gravaj taskoj de nia movado estas helpi tiujn esperantistojn, kiuj restas izolitaj en siaj vilaĝoj aŭ urboj, kie ne ekzistas Esperanto-grupo. Gastigi ilin al kunvenoj de grupoj proksimaj sendube multe helpus ilin superi tiun izolitecon, kiu povus endanĝerigi ilian restadon en la movado. Afable gastigi ilin en hejmoj esperantistaj donus al tiuj izolitaj esperantistoj la firmecon konsideri la filozofion () Esperanto kiel ion superan al nura lingvo. Krome kontaktoj inter izolita esperantisto kaj membroj de grupo sendube donus ŝancojn plilargigi la movadon. Oni ne devas forgesi, ke tre ofte la esperantisto, kiu dum monatoj kaj jaroj restis sen la rilato kun samideanoj, timas aŭ ne kuraĝas kontaktiĝi kun plej spertaj esperantistoj.

Estas kompreneble, ke ĉi tiuj konsideroj pri la Esperanto-Movado rilata al la izolitaj esperantistoj ne estas tre gravaj, sed ja oni devas atenti ĉiujn radikojn, se ni deziras, ke la arbo kresku svelta kaj fruktodona.

Luis Serrano Pérez

(El la 10a paĝo)

ricevanto konsideras la telojn de la haŭto aŭ de la reno de la donanto kiel strangan materialon, kaj liberigas rifuzan mekanismon de tipo antikorpa. La transdonoj povas sukcesi certe nur, se oni faras ilin inter unuvitelaj gameloj, kies korpoj posedas proteinajn materialojn kun identaj strukturoj, pro kio oni ne konsideras ilin strangaj. Nuntempe oni klopodas por la evitado de ĉi tiuj malfacilaĵoj, frigi la produktadon de gamaglobulinoj kaj, ja, oni konas substancojn, kiuj faras tion. Sub tiuj kondiĉoj, la ricevanto akceptos

(pluas sur la 4a paĝo)

(pluas sur la 2a paĝo)

SCIENCA PAĜO

IMUNKEMIO


La homa korpo reagas tuj fronte al la ĉesto de strangaj substancoj, kiuj, akcidente, eniras ĝin. La organismo ekzamenas zorge tian materialon kaj, kiam ĝi trovas ian kemian strukturan karakteron, kiu ne kutimas aperi en aliaj substancoj de la korpo, ĉi tiu produktas specifan proteinan materialon, kiu kapablas kuniĝi specife kun la stranga substanco, precipitante ĝin el la ĉirkaŭanta medio.

Per imunaj fakvortoj, la stranga substanco estas antigeno, kaj la proteino, kiu respondecas pri ĝia forigado, antikorpo. La ĉefa proteino de ĉi tiu tipo estas la gamaglobulino de la sango de la gastiganto. La komenca reakcio antigeno-antikorpo favoras, per meĥanismo, kiun oni ne perfekte konas, la produktadon de grandaj kvantoj de la specifa antikorpo. La eksceso de antikorpoj restas en la sanga fluo donante al la homa korpo specifan imunon, kiu daŭras tiel longe, kiel la preparolita eksceso ekzistas: en tiaj kondiĉoj ia nova aldono de antigeno ne efikos malutile, ĉar ĝi estos tuj precipitata.

Domaĝe, la imuno ne estas necese restanta kondiĉo; ĝia daŭro ŝanĝiĝas de kelkaj horoj ĝis la tuta vivo, laŭ la naturo de la antigeno. Tiel, la imuno kontraŭ la variole daŭras longe, dum tiu de ordinara kataro daŭras nur kelkajn tagojn aŭ semajnojn.

Gravas rimarki, ke la imuno kontraŭ konkreta antigeno estas altgrade specifa. Ĉiu stranga ĉelo nova, kiu invadas la korpon, produktas la aperigadon de specifaj antikorpoj, kiuj amasiĝas en la sango sub la formo de gamaglobulinoj. Estas evidente, ke la sangaj gamaglobulinoj de ĉiu individuo dependas de la ĉeloj strangaj ene de ĝi.

La fenomeno antigeno-antikorpo klarigas pli precize la malfacilaĵojn kaj fiaskojn ĉe la transdonoj de haŭto, renoj kaj koro inter samspecaj individuoj. La korpo de la



Je la fino de la pasinta dua ĉapitro la onklo intencis iri Cucufatan pro tio, kion ŝi diris. Sed tiu ĉi konvinkis sian onklon pere de sia heredo, ĉar, ni ne diristion antaŭe, Cucufata estas trege riĉa, sed ŝi ne povas disponi pri la heredo, ĝis ŝi edziniĝos. Pro tio ŝia onklo ege deziris, ke Cucufata edziniĝu al lia filo, Alan. Alan estas belega knabo, forta, alta, blondhara, blukula; tio estas, ideala. Sed ili abomenis unu la alian.

Cucufata, minace, diris:

-Onklo, mi avertas, ke mi ne edziniĝos al mia kuzo...

-Ho, mia kara nevino! -hipokrite diris la onklo-. Vi scias, ke mi amas vin multege, kaj via kuzo multe pli! Neniam vi ripetu tion, kara.

Subite la sonorileto gaje eksonis.

-Via kuzo!

-Mia malbenata kuzo -diris mallaŭte Cucufata.

-Kion?

-Mi diris: mia amata kuzo -respondis Cucufata devigante sin rideti.

-Saluton! -diris Alan kaj eksaltetis sur la sofona.

-Saluton! -diris Cucufata kaj eksaltetis sur la balkonon.

-Saluton! -diris la onklo kaj eksaltetis sur la lampon.

-Bum! -diris la lampo kaj eksaltis sur la plankon, ĉar kompreneble nenio lampo povas subteni la onklon.

-Ha, mi estas kontenta -Alan ridetis. La onklo eliris.

-Kial? -demandis Cucufata.

-Ĉar mi enamiĝis al ia bela fraŭlino, kiu nomiĝas Puri.

-Kiooon? -ŝi diris kaj poste pensis: -Ĉu eble la destino deziras, ke ĉi tiu Puri estu tiu Puri, pri kiu mia onklo parolis, kiam li diris, ke li konis fraŭlinon nomatan Puri? Ho, Puri!

Grandega enigmo. Ĉu ĉi tiu Puri, pri kiu Alan parolis, kiam li diris, ke li enamiĝis al fraŭlino nomata Puri, estas la sama Puri, pri kiu la onklo parolis, kiam li diris, ke li konis fraŭlinon nomatan Puri? Kiu estas Puri, ho Puri? Ĉu la kuzo kaj, do, la onklo, atingos la heredon, aŭ la kuzo donos nenion al sia patro? Ni fine scios ĉion per la venonta ĉapitro.

